



## KONDIĈOJ DE ABONO

Abono jara : { En Francando : 4 frankoj. | Unu numero :  
 Ekster — 5 fr. | 0 fr. 50, afrankite.

Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj: oktobro, januaro au marto. La Revuo ne aperas en aŭgusto nek en septembro. Postmarkoj estas akceptataj por efektiva valoro.

Anoncoj. — Tuta paĝo kostos 15 frankojn ; — duona paĝo 7 fr. 50 ; — 4<sup>na</sup> paĝo : 4 fr. ; 8<sup>na</sup> paĝo : 2 fr. 50 ; 16<sup>na</sup> paĝo : 2 fr. Por anoncoj ripetitaj, rabatoj : por tri fojoj 10 % ; — por ses fojoj : 15 % ; — por 10 fojoj : 20 %.

## KUN SES BELAJ ILUSTRAĴOJ KATO KUN BOTOJ.

Kosto : 0 fr. 50, afrankite. Aĉetebla ĉe la Direktoro de E. K. Specialaj kondiĉoj por almenaŭ dek ekzempleroj kune mendataj.

## UNUA JARO DE REVUO E. K.

Kolekto de la dek karejoj (88 paĝ).

RAKONTOJ, ARTIKOLOJ DIVERSAJ PRI NUNTEMPAJ

AFEROJ, K. T. P. — AFRANKITE : 2 fr.

Ĉe la Direktoro de E. K.

## DUA JARO

De E. K. estas ankaŭ aĉetebla je samaj kondiĉoj.

**La tuta kolekto ĝis marto 1906 : 5 frankojn.**

HO, MIA KOR : Kanto Esperantista. Poezio de D-ro Zamenhof. Muziko de S-ino José GUVY. — Plej ŝatinda muzikaĵo, kantita en Boulogne, dum la Kongreso. Aĉetebla ĉe la Presa Esperantista Societo, kaj ĉe la Direktoro de E. K. — Prezo : 1 fr.

## KORESPONDADO DE LA DIREKTORO

Al S-o T. (en Croix, Nord) : Diru mi faras al vi plesuron : — La frazo : mi plesurigas al vi, estas nek korekta, nek klara.

Al S-ino M. (Lyon). — Plezure mi ricevos viajn tradukojn. Ne estas necese, ke vi sendu ion ĉiumonate. — Koran dankon antaŭe.

Al S-o Wem. (Lovenjo) — Mi bone ricevis vian sendon. Koran dankon.

# ESPERO KATOLIKA


## ENHAVO

	Pages
LA DIREKTORO Esperanto kaj Katolikoj.....	33
— Oni bezonas novajn abonantojn	35
CH. ZACHERL Historia memoraĵo pri Napoleono	36
LETERO EL NORVEGUJO, Nils Okland, el Hangesund.....	38
P-ro Dombrovski PRI ESTONTA RUSEKLEZIA KONSILIĜO.....	39
KATOLIKAJ PAĜOJ, trad. Vinko.....	41
UNUA INTERNA VIDO AL JESU KRISTO, esp. Eleda...	42
HELENA TÔRÔ La civila edziĝo	43
LA LASTA ABENCERAĜO ( <i>Châteaubriand</i> ) trad Eleda kaj Vinko	44
EN ESPERANTUJO : Revuo de la revuoj esperantistaj ; Lingvaj demandoj	48
NOTETOJ. — BIBLIOGRAFO. — MONOFEROJ. — ABONMONOJ RICEVITAJ. — ERATUMO. — ŜAKOJ .....	60

## ESPERANTO kaj KATOLIKOJ <sup>(1)</sup>

Se mi devus fari paroladon al katolikaj pri Esperanto, jen kelkaj el la ĉefaj ideoj, kiujn mi detaligus antaŭ ili :

La katolikoj devas esti la plej fervoraj pioniroj de Esperanto, ĉar ili formas societon nelimigitan al iu nacio, sed kon-



traŭe, esence tutmondan, esence difinitan por disvastiĝi tra la tuta tero. Tia societo ja bezonas universalan interkomprenilon.

(1). — Parto de tiu ĉi artikolo aperis en TRA LA MONDO (feb). kun la portreto de la direktoro de E. K. — Dank'al l'afableco de TRA LA MONDO kiu pruntiĝis al ni la kliŝaĵon, ni povas hodiaŭ publikigi tiun portreton.

Tio estas tiel vera, ke la plej granda parto de l'katolikaro uzas oficiale kaj liturgie la latinan lingvon (oni uzas ankaŭ la grekan, la armenian, en kelkaj katolikaj ritaj).

Sed precize tial ke Eklezio uzadas la latinan, la katolikoj kredas ke ili ne bezonas Esperanton.

Mi ne havas lokon por longe diskutadi tiun plej komunan kontraŭdiron. Mi ordinare respondas; la katolikoj bezonas internacian lingvon por publikigi per ĝi librojn, kiuj interesas la tutan katolikaron, ekz., librojn pri dogmaro, pri historio de Eklezio, pri Bibliaj studoj, pri apologiaj temoj, ktp; la katolikoj devus uzi internacian lingvon por eldoni internaciajn revuojn pri la diversaj fakoj de pastraj sciencoj; por universalaj kongresoj katolikaj; por pritrakti la moralajn, filozofiajn, socialajn temojn.

Kial do ili neniam uzadas la latinan por tiuj diversaj celoj (aŭ preskaŭ neniam, nur por kelkaj teologiaj libroj)? Ekzistas Internacia Revuo Biblia: ĝi eldoniĝas... *france*! Tamen ĝi sin turnas al kleruloj, kiuj ĉiuj konas la latinan. Kial do ĝi ne eldoniĝas *latine*? Oni konsciis, kredeble, ke nur malmultaj verkistoj estis kapablaj latine skribi longan artikolon aŭ serion da studoj. Jen fakto pripensinda!...

Mi povus ankaŭ pruvi, ke latinaĵo ne sufiĉas por ĉion internacie pritrakti, eĉ Bibliajn studojn. Efektive, en tiuj studoj, oni devas utiligi la plej novajn eltrovojn de modernaj sciencoj; fizikaj, biologiaj, kemiaj, geologiaj, k. c. La latina malhavas multajn esprimojn tute necesajn por tiuj sciencoj. Mi dirus ankaŭ — kaj la faktoj, ho ve! estus ironiaj argumentoj, — ke kongresoj internaciaj en kiuj oni parolas nur latine estas ja nepraktikblaj.

Sed, laŭ mi, jen l'argumentado ĉefa kaj plej grava por altiri katolikojn al Esperanto:

Katolikismo instigas la homaron al *progreso morala*; ĝi celas unuiĝon de l'homaro en unu vera religio, en sincera frateco. Tial ĉio, kio estas « progreso », devas interesi katolikojn. La celo de l'tuta naturo kaj de ĝiaj fortoj devas esti « la servo al homo » la perfektigokaj plinobligo de l'homo, diris Episcopo irland, (1)

(1) *La homara progreso*, parolado ĉe la malfermo de l'Ekspozicio de Chicago, en 1892.

Pereu la negoco, pereu komerco, se la homo devas per ĝi malpli juste senti tion, kio estas rajto ; se la homa koro per ĝi devas hardiĝi, Pereu la plej perfekta mekanika eltrovo, se ĝiaj senkonseciaj radoj forigas, en sia senkompata movado, la purecon kaj feliĉecon de l'homaj animoj. La laboro estas malbena, se per ĝi homo fariĝas sklavo de l'materio kaj al ĝi estas similigita. La riĉeco de l'nacioj estas blasfemo kontraŭ la Kreinto, se tiuj riĉecoj kondukas la posedantojn al egoismo kaj al mallarĝeco de l'spirito, — se l'amasego de riĉecoj kondamnas la popolamason al mizero kaj peko ; la multekosta estaĵo estas ja *la homo* ; estas *li* tiu, kiun oni devas savi kaj plinobligi : la progreso de l'homo estas la sole vera progreso.

« Kiam mi diras *homo*, mi ne signifas nur kelkajn homojn disajn en la amasego de iliaj similuloj. Se nur malgranda nombro alvenis al la plej alta nobleco, kaj se en la sama tempo, la plimulto restadas en la mallumaj valoj de sufero kaj de spirita morto, *la homo* ne progresadis. Dio ne limigas sian zorgadon al la malplimulto. Li zorgas pri ĉiuj. La Progresado, kiun Dio volas, estas tiu de l'tuta homaro, kaj nur tiu ĉi meritas la nomon : Progreso ! »

Ĝis nun la materiala progreso multe antaŭiris la moralan : tio estas unu el la plej gravaj kaŭzoj de la bedaŭrinda stato societa en preskaŭ ĉiuj nacioj. Mi estas plene konvinkita, ke la lingvo Esperanto estas la plej potenca helpilo al progresado morala. Tial Katolikismo kaj Esperantismo estas « ideoj-fratinoj » ; ili devas reciproke sin kuhelpadi kaj laboradi unu por l'alia. Lati-naĵo daŭru esti la lingvo liturgia kaj oficiala de l'Eklezio. Sed flanke de ĝi, la katolikoj ricevos grandegan utilon de la lingvo Esperanto, precipe kiam *Espero Katolika* fariĝos 32-paĝa, kaj poste 100 paĝa revuo. Ili per Esperanto rapidigos l'alvenon de l'dezirinda kaj ĉiam celita unuiĝo de l'homaro en sankta frateco.

Pastro EM. PELTIER, Direktoro de *Espero Katolika*.

---

## ONI BEZONAS NOVAJN ABONANTOJN

Antaŭ la egiĝo de E. K. oni ofte skribis al ni : « Estas neeble fari propagandon por tiel malgranda gazeto. » Nun tiu argu-



mento ne valoras. E. K. estas sufiĉe respektinda por ke oni kuraĝu ĝin montri.

Ni jam ricevis multajn gratulojn pro nia marta numero. Ni provos ĉiam kontentigi nian legantaron publikigante en E. K. artikolojn kiel eble plej diversajn.

Aferoj seriozaj aŭ senlacigaj, nuntempaj aŭ historiaj, socialaj aŭ simple literaturaj, estos vice pritraktataj. Tial la revuo estos interesa por ĉiuj, kaj oni bone faros tion diradi al la *varbotoj*.

Ni dediĉas niajn fortojn al la direktado kaj redaktado de E. K. Vi, bonaj legantoj, devas zorgi mem pri la propagando.

Ĉiumatene, kiam vi leviĝas, pensu, kaj repensu E. K. bezonas novajn abonantojn !

*De nun mi plezure raportos en E. K. pri la penadoj de la legantoj por la propagando per interparoladoj, per ĵurnaloj lokaj, per broŝuroj, per publikaj paroladoj, ktp.*

Ni havos amason da novaĵoj pri la propagando por la proksima numero, ĉu ne? LA DIREKTORO.

## HISTORIA MEMORAĴO PRI NAPOLEONO

Kiam Napoleono 1-a estis sur la plejsupro de sia potenco, li volis, kiel nuntempe la liberala Italujo, ke la Papo, interŝanĝe de ĉiujara rento, ekŝiĝu kiel posedisto de la Ŝtatoj Papaj. Por devigi lin cedi, la potencegulo ordonis, ke la grandaĝa kaj malsanema Papo Pio VII-a estu malliberigota kaj kondukota al Fontainebleau.

« Pli volonte mi mortos en la malliberejo ol ke mi ŝargas mian konsciencon per tiel granda perfideco », respondis Pio al la pretendo de Napoleono. Kolerege, tial ke ekzistis sur la tero unu homo, kiu kuraĝis lin kontraŭstari, Napoleono kriis : « Ni finu la disputojn kaj la traktatojn ; ĉar vi ne volas havi mian amikecon, vi eksentos mian malamikecon. » — « Via imperiestra Moŝto, respondis la Papo, mi transdonas al Dio la zorgon pri mi ; nia Dio vivas ankoraŭ ! » — « Kion do vi esperas de li ? » — « Ke li venos por helpi kaj protekti, sian Eklezion ĝis la fino de l'tempoj, kiel li promesis. » — « Tiuj estas grandegaj promesoj, respondis Napoleono, fariĝinte pli kolera, ni vidos. Sed mi ne estas kontenta nek pri la Papo, nek pri la Ekezio de tiu

Dio. Eble mi fondos ankaŭ per mia propra potencego ŝtatre-  
ligion, kies ĉefo ne estos la anstataŭanto de Dio, sed la imperi-  
estro mem.»

— « Via Moŝto, vi trotaksas vian potencon. »

— « Mi povas fari ĉion en Eŭropo, diris kolerege la ven-  
kinto de tiom da popoloj, kaj ĉu mi ne povus humiligi la fie-  
recon de maljunulo, kiu nomiĝas l'anstataŭanto de Jesu-Kris-  
to, kaj rompi lian obstinecon ? Nu, la nekurbigeblulo estu  
mortonta kiel nia malliberulo. »

— « Konsideru bone, via Moŝto, diris la nobla malliberulo ;  
ĉiuj persekutintoj de l'eklezio estas pereintaj, sed la Eklezio  
ade ekzistas ankoraŭ. Vi persekutas l'Eklezion kaj malliberigis  
min, sed mi vivas malgraŭ miaj doloroj kaj malgraŭ ĉiuj miaj  
suferoj. Mi vivas por vidi, iam estonte, kiamaniere la mano  
de Dio vin ekpunos. Se via mezuro estos plena, vi partopre-  
nos je la sorto de la ceteraj persekutistoj. »

— « Neniam Napoleono estis aŭdinta tiajn parolojn. Lacigite  
sidiĝis la Papo, dum la reganto de Eŭropo, ekscitita pro kolero,  
la ĉambron forlasis dirante : « Via Dio frakasas nur malsaĝulojn ;  
kontraŭ la imperiestron li povas fari tute nenion. Sed vi eksentos  
mian koleron ! »

Tiel restis Pio VII-a malliberulo en Fontainebleau, mokegata  
de siaj servistoj francaj kaj en ĵurnaloj francaj ĝis post la ba-  
talado de Leipzig. Nun Napoleono ekkredis, ke estus pli bone  
liberigi lin. Tio okazis la 23-an de Januaro 1814. Kaj dum Pio  
revenis Romon, je la plej granda ĝojego de la loĝantaro, impe-  
riestro Napoleono devis, je la 14-a de Aprilo 1814 sian eksigon  
subsigni en Fontainebleau, — kaj tion fari en la sama ĉambrego  
kie la suprecitita interparolado estis okazinta.

En St-Helena la malfeliĉa imperiestro rememoriĝis je tiu  
sceno en la kastelo Fontainebleau-a. Nun li diris al la grafo  
Josef de Rethel « Vere, mia kara amiko, Dio vivas por fra-  
kasi la malamikojn de tiu, kiu lin anstataŭas tie-ĉi sur la tero.  
Oh ! ke mi povus do alvoki al ĉiuj, kiuj havas sur la tero  
potencranĝon « Honoru la anstataŭanton de Kristo ! Ne batalu  
kontraŭ la papo, ne submetu lin, ĉar se vi faras tion, vi estos

frakasataj de la venĝanta mano de tiu, kiu mem protektas ade la tronon de Sankta Petro. »

La grafo Josef de Rethel atingis grandan agon. Kiam Napoleono III-a, en la jaro 1870, elirigis el Romo la trupojn francajn kaj lasis Pio IX-an sen protekto, rapidis Josef de Rethel al la imperiestro kaj insiste lin petigis ne fordoni Pion IX-an en la potencon de la ĉi-tieaj malamikoj. La grafo memorigis la imperiestron pri la ĵus rakontita sceno en Fontainebleau kaj pri la konfeso de Napoleono 1-a en S'a Heleno.

« Tio estas vere mirinda », estis la indiferenta respondo de Napoleono III-a.

De Rethel ekvidis, ke pliaj admonoj estus vanaj; li finis dirante: « Se Francujo permesos ke Pio IX-a estu prirabota, transdonata al la arbitro de siaj malamikoj kaj tenata kiel malliberulo, denove fremdaj nacioj dezertigos Francujon, kaj via imperiestra Moŝto partoprenos je la sorto de sia onklo. » La imperiestro nenion alian respondis ol: « Sufiĉe; mi vin dankas pro viaj avertoj. »

La 2-an de decembro 1870 transdonis Napoleono III-a en Bellevue, apud Sedan, sian spadon al la reĝo de Prusujo kaj estis kondukata kiel malliberulo Wilhelmshohe'on.

ZACHERL CHARLES, el Passaŭ.

## LETERO EL NORVEGUJO

*Libereco religia — Esperanta batalado*

La jaro 1905<sup>a</sup> estis jaro tre rimarkinta en historio norvega. Jam nia popolo bataladis pace por la sankta libereco, kiu ĉiam estas al ĉiu popolo la plej grava kaŭzo por ke ĝi vivu, kresku kaj bone fartu. En nia paca batalado por libereco ni venkis, kaj hodiaŭ Norvegujo estas do libera lando, kies popolo estas gaja kaj esperplena.

La jaro 1906<sup>a</sup> portis al ni alian bataladon, — la religian bataladon. Al nia universitato venigis la ministraro novan teologian profesoron, S-o *Ordin*, kiu havas opinion, precipe pri la sakramentoj, ne tre multe diferenca de tiu de Kalvinistoj. Ortodoksa profesoro ĉe la universitato eksigis pro tiu kaŭzo el sia profesio;



kaj en la tuta lando nun estas granda bruo de religia batalado : « ortodoksanoj » kontraŭ la « novanoj ». Grandaj kunvenoj, starigitaj vice de ambaŭ partioj, okazas en preskaŭ ĉiuj pli grandaj urboj,

La tria batalado, pri kiu mi raportos, estas la *esperanta*. Ĝi estas ankoraŭ en sia infaneco. Sed tamen ĝi ekzistas kaj ĝi kreskas. Nun la gazetaro pli ol antaŭe sin okupadas pri l'afero, raportas pri ĝi, kaj ĝin laŭdas. Kelkaj gazetoj petis artikolojn de esperantistoj pri Esperanto. Ekzemple : la grava instruista gazeto. « *Norsk Skoletidende* » (Norvega lernaja gazeto), la virina organo *Nylände*, la ĉiutagaj gazetoj *Bergens, tidende, Stavanger amtstidende, Stavanger aftenblad*, havis grandajn artikolojn pri Esperanto. Pri la sama objekto eldonis artikolojn ankaŭ la malpli gravaj gazetoj *Hangesunds avis a Sondkordland* », « *Urd'* » (virina gazeto) kaj multaj aliaj.

En decembro 1905<sup>a</sup> fondiĝis ankaŭ » Societo de danaj kaj norvegaj esperantistoj. » En Kristiania estas nove fondita grupo kaj kurso kaj en urbo Haugesund ni esperas bakdaŭ fondi ankaŭ kurson kaj grupon.

La « printempo » venas !

NILS OKLAND, el HAUGESUND (Norvegujo).

## PRI ESTONTA RUSEKLEZIA KONSILIĜO

Kiel jam oni scias, ricevinte en la pasinta jaro permeson, la ruseklezia estraro ekdecidis kunvoki la ĝeneralan ruseklezian konsiliĝon. La hierarkio rusa sentas bone la gravecon de tiu ĉi historia fakto kaj tial tre zorge kaj peneme sin preparas al la venonta eklezia kunveno, kiu sendube ekscitos la atenton de la tuta kristana mondo.

La preparaj laboroj jam estas komencitaj. Por ilin devamaniere konduki oni kreis ĉe la S. Sinodo specialan komision, kiu la 6 (19) marton de l'nuna jaro en la palaco de l'Peterburga Metropolitano Antonio havis la unuan kunvenon. En ĝi partoprenis tri aliaj metropolitanoj, sinodaj membroj, sinoda ĉefprokuratoro kaj lia helpanto, multaj-ĉefepiskopoj kaj episkopoj Peterburgon alvokitaj, krom tio sufiĉe granda nombro da akademiaj

profesoroj, pastroj kaj laikoj, kiuj estas en Rusujo plej konataj pro sia kompetenteco en aferoj ekleziaj.

La kuveno komenciĝis per mallonga parolado de Lia Mastra Moŝto, metropolito Antonio. Ekmemoringinte en kelkaj vortoj pri la meritoj de l'Urba Patrono F. Aleksandro Nevski'a « kiu ne sole la patrujon estis defendinta de malamikaj atakoj de l'forta Okcidento, sed ankaŭ gardinta la eklezian liberecon de potencaj pretendoj de roma papo », la honorata parolisto montris la celon de l'venonta konsiliĝo; ĝi estas jena: en mezo de alikreduloj kaj alireligiuloj fortikigi la kristan liberecon de l'pravoslava eklezio, fondante ĝin « sur la neŝanceligeblaj principoj de l'pura eklezio ».

Post fervoraj dankoj al la parolisto de l'parto de ĉeestantoj, oni decidis onigi la diritan komision je sep sekcioj laŭ sekvanta maniero la 1<sup>a</sup> sekcio prezidantata de la ĉefepiskopo Vilna Nikandro sin okupos per la demando pri la reformo de eklezia administrado; la 2<sup>a</sup> prezidantata de la ĉefepiskopo Odesa Demetrio — per la demandoj pri de eparkio; la 3<sup>a</sup> prezidantata de la episkopo Mohileva Stefano — per la demandoj pri la organizado de paroĥoj; la 4<sup>a</sup> prezidantata de la episkopo Jaroslava Jakobo — per la demandoj pri la ekleziaj juĝoj kaj edzecaj aferoj; la 5<sup>a</sup> prezidantata de la episkopo Volinia Antonio — per la demandoj pri la sektistoj kaj ŝizmatoj (roskolnikoj) kaj pravoslavo kunkreduloj (jedinovjercoj; la 6<sup>a</sup> prezidantata de ĉefepiskopo Finlanda Sergio per la demandoj tuŝantaj la Diservon kaj kredon; la 7<sup>a</sup> prezidantata de la episkopo Pskova Arsenio — per la demandoj pri la pastraj kaj ekleziaj lernejoj.

La sekciaj kunvenoj fariĝos en la loĝejoj de S. Sinodo kaj de l'komitato instrua. La unua sekcio devos ankaŭ klarigi la demandon, kaj personoj havos la rajton partopreni en la venonta konsiliĝo en karaktero de membroj efektivaj. Ĉiujn suprajn noticojn ni prenis en la Rusa gazeto « Novoje Vremja », de 8 (21) Marto N° 10769.

Laŭ nia opinio la Katolika gazetaro devus tre atente rigardadi tiun estontan ruseklezian konsiliĝon. Ĉar multaj bedaŭrindaj difektoj de ruseklezia vivo sin trovas ankaŭ ĉe ni en la Eŭropa okcidento. La episkopoj en la lasta Vatikana konsiliĝo de 1870

jaro montris al Pio IX-a la sufiĉe grandan amason da difektoj kaj petis pri la konvenaj reformoj (Vidu C. Martin, Paderbonensis omnium Concilii Vaticani quæ ad doctrinam et disciplinam pertinent documentorum collectio, Ed. altera Paderbonæ, 1873, pp. 1452-64). Sed bedaŭrinde neniu el tiuj ĉi episkopaj postuloj fariĝis ĝis nun plenumita fakto.

La ekzisto de sufiĉe gravaj difektoj en nia nuntempa eklezia vivo estas nenia sekreto. Scias ilin ni katolikoj, sed pli bone scias kaj publike pri ili parolas la nekatolikoj. Ĉu ne estas tempo por ke eĉ nia eklezia estraro pri ili publike ekparolu kaj per konvenaj reformoj ekpenu ilin forigi. Komencas fari tion ĉi la ruseklezia hierarkio kaj sin preparas por tio ĉi al la venonta ĝenerala konsiliĝo : en gazetoj katolikaj aperis ankaŭ la noticeto pri la estonta baldaŭ katolika ĉiueklezia konsiliĝo. Donu Dio, ke ĝi plej baldaŭ efektiviĝu.

P-ro A. Domkrovski, el  
St. Peterburgo.

## KATOLIKAJ PAĜOJ

« Blaise Pascal, tre glora filozofa matematikisto kaj fizikisto franca, naskiĝis en la jaro 1623, en Clermont. Kiam li estis dudeksesjara, li malsaniĝis, kaj devis ĉesigi siajn grandajn studadojn. — Post ia tempo, sur la ponto de Neuilly, veturilo falo okazis al li. De tiu momento, li tre ofte kredis vidi kvazaŭ profundegajon, kiu malfermiĝis por lin engluti.

Tiam lia spirito priokupiĝis pri religio. — Cirkaŭ 1654 aŭ 1655, li loĝadis en Port-Royal, kie li verkis la « Provincajn leterojn. » Pascal mortis en la jaro 1662.

Bedaŭrinde li ne havis la tempon por fini apologion kristanan, kies fragmentoj estas publikigitaj sub la titolo : « *Pensoj* » )

### LA PERFORTECO SENPOVA KONTRAŬ LA VERECO

« Stranga kaj longa batalado estas tiu, en kiu la perforteco provas subpremi la verecon. Ĉiuj penadoj de l'perforteco ne povas malfortigi la verecon, kaj nur utilas por ĝin plialtigi. Ĉiuj lumoj de l'vereco povas nenion por haltigi la perfortecon,

kaj nur incitas ĝin ankoraŭ plie. Kiam la forteco batalas la fortecon, la plej pova detruas la malpli povan ; kiam paroladojn oni diras kontraŭ paroladoj, tiuj, kiuj estas veraĵoj kaj konvinkaj, detruas kaj venkas tiujn, kiuj estas nur vanaj kaj mensogaj ; sed la perforteco kaj la vereco povas nenion unu kontraŭ la alia. Tamen, oni ne pretendu pro tio, ke la aferoj estas egalaj : ĉar estas tiu ĉi ekstrema diferenco, ke la perforteco havas nur daŭron limigitan laŭ l'ordo de Dio.

« Li direktas ĝiajn efikojn por la gloro de vereco, kiun ĝi atakas ; kontraŭe la vereco eterne restadas, kaj fine triumfas pri siaj malamikoj, ĉar ĝi estas tiel eterna kaj pova kiel Dio mem.

(El *Les Pensées*, de Pascal).

Tradukis VINKO.

## UNUA INTERNA VIDO AL JESU-KRISTO

(Lacordaire (1802-1861) naskiĝis de burĝa familia el la provinco *Bourgogne*. Li unue studadis en lernejo Voltair'ana. kaj, la unuajn jarojn, ne tre sukcesis en siaj studoj. Nur en la « retorika klaso » liaj literaturaj ecoj ekmontriĝis. Li lasis la lernejon kiam li estis 17-jara kaj studadis juron. Li fariĝis pastro katolika en 1827, deputato al la Parlamento post la revolucio de 1848 ; membro de l'Instituto en 1860. Li precipe famiĝis per siaj elokventaj predikadoj en *Notre-Dame de Paris*.

« Oni renkontas Jesu-Kriston sur la tero, kiel oni renkontas alian homon. Ian tagon, je l'angulo de strato, sur dezerta vojeto, oni haltas, oni aŭskultas, kaj voĉo interne al ni diras : » « Jen Jesu-Kristo ».

« Momento de ĉiela feliĉo, kiam, — post tiom da belaĵoj ŝatitaj, kiuj ĝin trompis. — animo malkovras per fiksa rigardo la netrompantan belecon ! Tiu, kiu ĝin ne vidis povas ĝin kulpigi ke ĝi estas nur revo ; sed animoj, kiuj ĝin ekvidis, neniam ĝin forgesos..

« En rigardado alia, la lumo, — tiel pura, kiel ĝi estu, — falas sur estaĵojn ŝanĝemajn kaj mortemajn ; tie ĉi la lumo estas eterna, la objekto nedifektebla ; kaj la renkonto de unu kun l'altra, de la senmakula idealo kun la realo perfekta, kaŭzas en l'animo la plej grandan pasion en la plej granda virto ; pasion kiu plivarmigas la virton ; virto kiu balzamumas kaj senmortigas la pasion.

« Niaj plej karaj amikecoj estas malfortigitaj de l'aĝiĝo kaj de la plej etaj malfeliĉoj; kontraŭe la amo al Dio per Jesu-Kristo pligrandiĝas pro niaj malfeliĉoj kaj malfortecoj. Eble tiun amon oni perdas post l'infaneco, tial ke oni ĝin ricevis de aliuloj sur genuoj de patrino; sed kiam ĝi fine fariĝas nia propraĵo, frukto de nia sperto kaj vireco, nenio ŝancelas en ni la fortikajn certigojn.

« Tiu amo anstataŭas tion, kio ĉiutage en ni malfortiĝas kaj senkoloriĝas. Ĝi loĝas en niaj ruinoj por ilin subteni, en nia izoleco por ĝin konsoli, kaj kiam ni fine atingas la blankiĝitajn suprojn de l'vivo, en regiono de glacioj kiuj neniam fluidiĝas, ĝi estas nia lasta varmo kaj fina dezirego. Okuloj niaj ne povas plu vidi, sed ili ankoraŭ plori povas, kaj tiuj larmoj estas por la Dio, kiu larmojn ankaŭ verŝis mem por ni.

S. LACORDAIRE (5-a Predikaĵo de Toulouse).

Esperantigis : ELEDA.

## UNU LIBRO MONATE

### LA CIVILA EDZIĜO

(*Le mariage civil, — France*) de leĝdoktoro R. Lemaire, la simpatia eks-sekretario de la S. p. p. E. — Verko kronita de la Pariza Leĝ-Universitato.

La libro malfermiĝas per enkonduko, pruvanta la miksan karakteron, naturan, religian kaj civilan de l'edziĝo per la tradicioj kaj uzadoj de diversaj nacioj.

Poste ĝi estas dividita en du partoj : *historia kaj hritika*. La historia flanko, admirinde pritraktita montras unue penadojn de l'Eklezio por kunigi kun sia edziĝa sakramenta dogmo la patrinan leĝaron de l'Imperiestroj romanaj ĝis la reĝoj de la XIII-a kaj XIV-a jarcentoj. — Je tiu epoko, l'unuiĝo estas perfektega inter la du potencoj, *civila kaj eklezia*.

Sed tiumomente, la leĝistoj, la Parlamentoj, la reĝa potenco, laboradis por disunigi la kontrakton de l'sakramento.

Fine, je la Franca Revolucio, naskiĝis la civila edziĝo, ne nur disunuigita de l'sakramento, sed al ĝi kontraŭa; sen religiaj ceremonioj; kun ridikulaj idiliaj komedioj, pruvantaj ĝuste kaj klare, ke la revoluciaj leĝ-donantoj estis tiel malkapablaj



senti ridikulon kiel mankantaj je pratika saĝlarĝeco. — Tiele la homa kaj civiliza ŝago pri l'edziĝo, nur naskiĝis!

La dua parto estas kritiko. *parte leĝa, parte morala*, de l'civila edziĝo. S-o Lemaire pruvas la « *nelogikan kaj malbonan* » karakteron de tiu revolucia institucio. — Unue l'eksedziĝo ne estas en la plano de lia verko, sed ĝi el la civila edziĝo kiel natura konsekvenco. Tiu funesta ideo estos farinta sian evolucion — l'aŭtoro tion pruvas — kiam el ĝi naskiĝos la « *limtempa edziĝo, la libera unuiĝa vivo, la bonplezura edziĝo* » tiam oni vidos la « *tutan kaj finan bankroton* » de l'edziĝo, la ruinon de la familio kaj la malorganizadon de l'homa societo!

Post leginte tiun belegan libron, oni estas konvinkita, ke la civila edziĝo estas sociala malbonaĵo,

Tiu ĉi studo estas ankaŭ modelo de saĝa kaj klara diskutado tre bonstila kaj tute konforma je l'katolika dogmo.

Helena Tôrô, el Tours.

---

## LA LASTA ABENCERAĜO de Châteaubriand

Kiam Boabdil, lasta reĝo de Grenad, devis forlasi la regnon de siaj prapatroj, li haltis sur la supro de l'monto Padul. De tiu loko altega oni ekvidas la maron sur kiu la malfeliĉa monarko estis forironta per ŝipo Afrikon; ankaŭ ekvidiĝas Grenad', la Vega' kaj la Ksenik, rande de kiuj staris la tendoj de Ferdinando kaj Izabelo.

Vidante tiun belan landon kaj la cipresojn, kiuj ankoraŭ montris tie ĉi kaj tie la mahometanajn tombojn, Boabdil ekverŝis larmojn.

La sultanino Aikso, lia patrino, kiu lin akompanis en lian ekzilejon kun la altranguloj, iam korteganoj liaj, diris al li

— Ploru nun laŭvirine pri regno, kiun vi ne scjis defendi laŭvire.

Ili malsupreniris de l'monto, kaj Grenad' — por ĉiam malaperis je siaj okuloj. La Hispanaj Maŭroj, kiuj partoprenis la sorton de sia reĝo, disiris en Afrikon. La gentoj de l'Zegris kaj de l'Gomel loĝiĝis en la regno Feza, el kie ili devenis. La Vane-gas'oj kaj Alabes'oj haltis sur la marbordo de Oran' ĝis Alĝer'; fine l'Abenceraĝoj vivadis en la cirkaŭaĵoj de Tunis. Ili for-

mis, apud la ruinoj de Kartago, kolonion, kiu estas ĝis nun distingebla de l'Afrikaj Maŭroj pro l'eleganteco de siaj moroj kaj pro la humaneco de siaj leĝoj.

Tiuj familioj enportis en sian novan patrujon la memoron de sia malnova patrolando. La *Paradiso de Grenad'* ĉiam vivadis en ilia pensado; la patrinoj rediris ĝian nomon al la infanoj, kiuj ankoraŭ suĉis la mamon. Ili lulis *ilin* per la kanto de la romancoj Zegris'aj kaj Abenceraĝ'aj. Ĉiukvintage, sin turnante al Grenad' oni preĝis en la moskeo, oni alvokis Allah'on por ke li redonu al siaj elektitoj tiun teron ĉarmplenan.

Vane la lando de l'Lotofaĝoj prezentis al la ekziluloj, ĉiajn fruktojn, akvojn, ĝian verdaĵon kaj brilan sunon malproksime de l'*Turoj Orumitaj*<sup>1</sup>, estis nek agrablaj fruktoj, nek klaregaj fontanoj, nek freŝa verdaĵo, nek rigardinda suno. Se oni montris al ia ekzilulo la ebenaĵojn de Bagrada, li skuis la kapon kaj ekkriis sopirante:

— Grenad'!

La Abenceraĝoj precipe konservis la plej ameman kaj la plej fidelan memoron pri l'patrujo. Ili estis lasintaj, kungrandega, mortiga bedaŭro, la ejon de sia gloro, kaj la bordojn, kiujn ili tiel ofte igis sonori per tiu bataalkrio:

« HONORO KAJ AMO »

Tial ke ili plu ne povis uzi la lancon en la dezertoj, nek vesti la kapon per kasko, en kolonio de plugistoj, ili sin dediĉis al la studado de medicinaj kreskaĵoj, profesio tiel ŝatitá ĉe l'Araboj kiel la militmetio.

Tial, tiu ĉi raso de militistoj iam faranta vundojn, nun okupiĝis pri l'arto ilin resanigi. Tiele ĝi konservis ion de ĝia unua genio ĉar la kavaliroj ofte bandaĝis mem la vundojn de l'malamiko, kiun ili estis faligintaj.

La dometo de tiu ĉi familio, kiu posedis iam palacojn, ne kuŝis en la vilaĝeto de ceteraj ekziluloj, malsupre de l'monto Mamelif: ĝi estis konstruita inter la ruinoj mem de Kartago, ĉe l'marbordo, en la loko kie Sankta Luiso mortis sur cindro, kaj kie oni vidas nun mahometanan ermitejon.

1. Turoj de l'Grenad'a palaco.

Je la muroj de l'dometo pendis ŝildoj leonfelaj, sur kiuj estis desegnitaj, sur lazura kampo, du figuroj de sovaĝuloj disrompantaj urbon per bastonego. Cirkaŭ tiu ĉi devizo tiujn vortojn oni legis :

GI ESTAS MALMULTE !

insignoj kaj devizo de l'Abenceraĝoj. Lancoj ornamitaj per blankaj-bluj standardetoj, burnusoj, « kazakoj »<sup>1</sup> el atlasaj distranĉaĵoj, estis ordigitaj apud la ŝildoj kaj brilis inter kurbglavoj kaj ponardoj.

Ankaŭ vidiĝis dise penditaj fergantoj, enbuŝaĵoj ornamitaj per multekostaj ŝtonoj, largaj arĝentajn piedingo, longaj glavoj, kies ingoj estis broditaj per la manoj de l'princinoj, kaj oraspronoj per kiuj la Izeult', Genievr', Orian', iam piedvestis kuraĝajn kavalirojn,

Sur tabloj, malsupre de tiuj ĉi venkosignoj gloraj, kuŝis venkosignoj de pacema vivo ĝi estis kreskaĵoj kolektitaj sur la suproj de l'monto Atlas' kaj en la dezerto de Zaara'; eĉ multaj estis alportitaj de l'Grenad'a ebenaĵo. Unuj taŭgis por kuraci la malsanojn korpajn; aliaj povis plie resanigi la ĉagrenojn animajn.

La Abenceraĝoj precipe ŝatis tiujn, kiuj helpis kvietigi la vanajn bedaŭrojn, forpeli la malsaĝajn iluziojn kaj tiujn esperojn de feliĉo ĉiam renoviĝantajn, ĉiam trompantajn.

Bedaŭrinde tiuj medicinaj kreskaĵoj havis kontraŭajn proprecojn, kaj ofte la bonodoro de patrolanda floro estis kiel ia veneno al la gloraj ekziluloj. Pasis dudek-kvar jaroj de l'militpreno de Grenad'.

Dum tiu ĉi mallonga intertempo dekkvar Abenceraĝoj pereis pro l'influo de nova klimato, pro la okazintaĵoj de vaga vivado kaj precipe pro la ĉagreno, kiu sekrete konsumas la fortojn de l'homo.

Unu ido estas la tuta espero de tiu familio fama. Aben-Hamet havis la nomon de tiu Abenceraĝo kulpigita de la Zegrisoj tial ke li delogis la sultaninon Alfaïmas. Li posedis la belecon, valoron, ĝentilecon, malavarecon de siaj prapatroj; kun tiu dolĉa rebrilo kaj malĝojeta ŝajno, kiujn lasas al ni la malfeliĉo noble suferata.

<sup>1</sup>. Kazako », surtuto kun largaj manikoj

Li estis nur dudekdu-jara kiam lia patro mortis; tiam li decidis pilgrimi al la lando de siaj praavoj por kontentigi sian koron, kaj plenumi intencon, kiun li zorge kaŝis de sia patrino.

Li enŝipiĝas al Tunis; favora vento kondukas lin al Kartageno; li malsupreniras el la ŝipo kaj tuj vojiras al Grenad'; li prezentis sin kiel Araba kuracisto veninta por kolekti herbojn inter la ŝtonegoj de la Sierra-Nevada.

Kvieta mulino malrapide portis lin tra la landon, kie la Abenceraĝoj iam rajdis sur militamaj ĉevaloj: antaŭen rajdis gvidisto, kondukante du aliajn mulinojn ornamitajn per tintiloj kaj per lanaj diverskoloraj tufoj. Aben-Hamet trairis altajn erikejojn kaj palmajn arbaretojn de regno Murcia: pro la maljuneco de tiuj palmarboj li juĝis, ke ili estis plantitaj de siaj patroj kaj lia koro je bedaŭroj pleniĝis.

Tie staris turo en kiu observis la gardostaranto, en tempo de milito inter Maŭroj kaj kristanoj. Tie ĉi vidiĝis ruino, kies arkitekturo montris Maŭran devenon; alia doloriga motivo por l'Abenceraĝo! Li malsupreniris de l'mulino, kaj pretekste serĉi medicinajn kreskaĵojn, li kaŝiĝis, momente, en tiuj ruinaĵoj por pli libere ploradi.

Poste li songante revojiris akompanata de la karavanaj tintiloj kaj de l'unutona kanto de sia gvidisto. Tiŭ ĉi interrompis sian longan romancon nur por eksciti siajn mulinojn, donante al ili nomojn: « belulinoj », kaj « valoremulinoj » — aŭ por ilin ri-proĉi, nomante ilin: « mallaboremaj » kaj « obstinaj ».

Ŝafaroj, kiujn paŝtisto kondukis kiel armeon sur ebenaĵoj flavaj kaj senkulturaĵ; — kelkaj izolitoj vojaĝantoj, anstataŭ ĝojigi la vojon, nur faris ĝin pli malĝoja kaj dezerta. Ĉiuj vojaĝantoj havis glavon je la zono, ili estis envolvitaj per mantelo, kaj larĝa ĉapelo duone mallevita kovris la vizaĝon. Pasante ili salutis Aben-Hamet, kiu distingis en tiu nobla saluto nur la nomon de *Dio*, de *Sinjoro* kaj *Kavaliro*.

Vespere ĉe la *Venta*, l'Abenceraĝo inter la fremduloj sidiĝis, ne tedata de ilia maldiskreteco. Oni ne parolis al li, oni ne demandis pri li; liaj turbano, robo, armiloj ekscitis nenian movon. Ĉar Allah' volis, ke la hispanaj maŭroj perdu sian belan patrolandon, Aben-Hamet ne povis ne estimi la gravajn almi-litantojn.

Impresoj ankoraŭ pli fortaj restis por l'Abenceraĝo, je la fino de sia vojaĝo. Grenad' estas konstruita malsupre la Sierra-Nevada, sur du altaj montetaj, kiujn apartigas profunda valo. La domoj, kiuj kuŝas sur la deklivo de l'monteto, en la fundo de l'valo, montras la urbon kiel granato duone malfermita ; — el kio devenas ĝia nomo.

Duriveroj, la Ksenil' kaj la Duro, kies unu derulas orajn brilajetojn kaj l'alia argentajn sablerojn, banas la malsupron de l'montetoj, kuniĝas kaj poste zigzagas meze de ĉarma ebenaĵo nomita *la Vega*. Tiu-ĉi ebenaĵo, kiun superas Grenad, estas kovrita per vinberoj, granat-, fig-, morus- kaj oranĝarboj ; ĝi estas ĉirkaŭita per montoj kies formo kaj koloro estas admirindaj.

Rava ĉielo, pura kaj bonega aero en la animon enirigas ion malfortigan, kontraŭ kiu la vojaĝanto eĉ nur pasanta malfacile sin defendas. Oni komprenas, ke en tiu lando, la amemaj pasioj rapide detruoaus la herjn pasiojn, se l'amo por esti vera ne bezonus esti akompanata de gloro. Kiam Aben-Hamet ekvidis la supron de l'unuaj monumentoj de Grenad', lia koro tiel fortege batadis, ke li devis haltigi sian mulinon. Li krucigis la brakojn sur sia brusto, kaj la okulojn fiksitaĵajn al la sankta urbo, li staradis muta kaj senmova.

La gvidisto haltis siavice, kaj tial ke altegaj sentoj estas facile komprenataj de hispano, li ŝajnis kortuŝita kaj divenis, ke la Maŭro revidas sian iaman patrujon. L'Abenceraĝo fine ekparolis :

(*Sekvo venos.*)

Tradukis Eleda kaj Vinko.

---

## EN ESPERANTUJO

### REVUO DE LA REVUOJ ESPERANTISTAJ

El la Internaciaj Revuoj.

**Lingvo Internacia.** (Feb. 1-a). — Konsideroj pri la monda sistemo (sekvo), de Marcel Finot :

« Tuŝante la formon de nia loĝejo, ni ne eĉ havas ĉiujn la samajn ideojn ; oni longe kredis ke ĝi estas plata ; Galileo elpensis tiun kuraĝan ideon, ke ĝi estas sfera, kaj ni tiel pensas. Sed hodiaŭ



# ALDONO AL LA N-o 28-a

## DE ESPERO KATOLIKA.

**Preseraroj** en la N-o aprila (27) de *Espero Katolika*. — Malgraŭ la korektaĵoj montritaj sur la presprovaĵoj, la presisto bedaŭrinde lasis multajn preserarojn en la n-o aprila. Ni do devigis lin presi apartan folion kun la korektaĵoj.

Paĝo : Linioj

	de supre .	de malsupre ;	Anstataŭ	Legu
33		1	pruntié	prunti
33		1	porireton	portreton.
34	3		ritaj	ritoj
«		17	estaŝ	estas
»		14	pritakti	prirakti
»		9	nepraktikblaj	nepraktikeblaj
»		1	ireland	Ireland
35		6	100 paĝa	100-paĝa
36	10		mém	mem
»	14		ĵurnaloj	ĵurnaloj
a		12	miŝargas	mi ŝargas
»		4	protekti, sian	protekti sian
38	6		petigis	petegis
»	9		S'a Heleno	S-a Heleno
»		11	rimarkinta	rimarkinda
»		2	diferenca	diferencan
39	10		lernaja	lerneja
»	14		Hangesunds	Haugesunds
»	»		a	kaj
»		13	jaro permeson	jaro Caran permeson
»		2	multaj--ĉefepiskopoj	multaj ĉefepiskopoj
40	3		kuveno	Kunveno
»	4		Ekmemoringinte	Ekmemoriginte
»		15	ŝizmatoj	skismuloj
»		14	(jedinovjercoj ;	(jedinonovjercoj) ;
»		4	Katolika	katolika
41	13		veturilo	veturila
»		16	« Blaise Pascal	(Blaise Pascal.
42	13		diras » « Jen	diras : « Jen
»		16	de Paris,	de Paris.)
43	5		disunigi	disunuigi
»		15	enkonduko, pruvanta	enkonduko pruvanta
44	2		ŝago	saĝo
»	3		parte	parte

Paĝo :	Linioj		Anstataŭ	Legu
	de supre:	de malsupre		
»	6		ĝi el la civila	ĝi elvenis el la civila
»	9		edziĝo »	edziĝo » ;
»		6	Grenad' -- por ĉiam	Grenad'por ĉiam
»		15	Ksenik	Ksenil
45		16	kungrandega	kun grandega
46	11		arĝentajn	arĝentaj
»	13		pievestis	pievestis
47		12	izolitoj	izolitaj
48	3		montetaj	montetoj
»	11		fig, —	fig -,
»	17		detruoaus la herjn	detruus la heroajn
49	3		Tion ĝi precipe	Tion precipe
»	14		simpla, Tero	simpla. Tero
»	16		grandaj-rompo kaj	grandaj rompo kaj
»	16		kvarra	kvara
50	3		verho	verko
»		2	kreskaĵo	kreskaĵo
»		12	aŭ arabe. <i>sultan</i>	aŭ arabe <i>sultan</i>
»		13	<i>bu go</i>	<i>burgo</i>
51	3		geslavojn	gesklavojn
»	6		milisto	militisto
»	16		kaŭzoj ĉu ne	kaŭzoj (ĉu ne
52	1		kie	kiel
»	10		Ponchet	Pouchet
52	9		spontenea	spontanea
»		4	venota	venonta
»		17	nunla	nun la
53	2		veron	veran
»	12		Michel Provins,	Michel Provins.
»		14	la frunto pruvas	la frunto, pruvas
»		15	penetraĵo ekzemple	penetraĵo, ekzemple
54	7		definita	difnita
55	2		Sciencaj	Sciencoj
»	9		sufice	sufiĉe
»	10		Esperantitaj	Esperantistaj
»	15		sufice	sufiĉe
»		13	verkoj nen	verkojn en
»		15	por	per
56	11		karo	koro
»		14	Esperanto » Bonega	Esperanto. » Bonega
»		15	riprezentano	riprezentanto

Paĝo : Linioj

	de supre	: de malsupre :	Anstataŭ	Legu
57	8		leĝaro,	leĝaro.
»		14	jurnaloj	jurnaloj
»		15	ekceptota	akceptota
58		14	ekster, tiu kongreso	ekster tiu kongreso
60	7		empresi	enpresi
»		2	infinivitani	infinivani <i>i</i>
»		5	inicitiv	iniciativ
61	13		kabe	Kabe
»	15		e l'trize	de l'tre
»	17		nacismon	naciismon
»		4	poesiojn	poeziojn
»		5	poezoj	poetoj
»		8	Cu	Ĉu
61		11	prezipe	precipe
»		13	niensia	ni en sia
»		14	« <i>antaŭparolo</i> »	« <i>antaŭparolo</i> »
62	6		cetis	estis
»	13		24 paĝa por la	24-paĝa tre utilos por la
63	5		anko raŭ	ankoraŭ
»		14	ostos	estos
»		3	Leciono III	Leciono V
64	12		m. aŭ ŝm.)	(m. aŭ ŝm.).
»	23		kiel	kiel
»	23		eblajn	eblajn
SUR LA KOVRILO				
1		10	Nowry Swriat	Nowy Swiat
2		21	karejoj	kajeroj

— En la problemo ŝaka, la nigra K devas esti ĉe 1 KR de Nigro, kaj la apuda nigra S devas esti ĉe 2 ĈR de Nigro.

oni ne plu pri tio estas certa, kaj kelkaj scienculoj pretendas que ĝi havas formon de kvarflanka piramido.

Tion ĝi precipe diras unu el la plej junaj kaj famaj francaj astronomiistoj, abato Moreux, kiu eldonis gravan laboron pri la suna sistemo. Li provis montri, per la rilatoj inter la sunaj makuloj kaj pluvoj teraj, per la temperaturo kaj precipe la rekomencoj de vulkana aktiveco sur la supraĵo de la globo, aŭ pli ĝuste de la planedo, ke la vorto « globo » estas eraro.

Efektive laŭ la lerta astronomiisto, Tero ne estas sferforma, kiel oni diras en la lernejoj. Jen estas, kiel eble plej rapide, kiel S-o Moreux klarigas la piramidformecon de Tero, ne donante la eltrovon kiel sian, sed lasante la unuan gloron al iu Lowthian Green, kaj bedaŭrante ke ĝi estas preskaŭ nekonata, malĝraŭ ke ĝi estas mirinde simpla, Tero estus do simila je granda ovo, iom platigita ĉe tri flankoj kaj sube, kontraŭe je la pinto; ĝi estas do proksimume kvarflanka piramido.

Kiam oni rigardas terfiguraĵon, oni ekvidas ke oceanoj okupas tri flankojn regulajn unue la profundan kavajon de Pacifiko; due tiun de India Oceano; trie tiun de Atlantiko. Tiuj grandegaj profundaĵoj, kiuj estas 10 kilometroj profundaj, estas grandaj-rompo kaj platigo-ebenoj de la ŝelo. La kvrra flanko de la piramido, kiu estas la fundamento, estas la Norda Poluso. De la vojaĝo de Nansen neniu pli dubas ke tie ekzistas granda profundaĵo. La pinto de la piramido estas la suda Poluso, kie, sur tute bone konata kontinento esploristoj eltrovis tre altajn montegojn.

La anguloj de la piramido estas la jenaj; la montoj Rokaj kaj iliaj daŭrigoj en Andoj; la altaj plataĵoj de Groenlando, Islando kaj Alpoj, de nordo al Sudo de Eŭropo; la linio de montoj de Abisinio, kaj Madagaskaro; fine la altaj supraĵoj de Tibeto, Malaisa insularo kaj ilia daŭrigo en Aŭstralio. »

**Febr. 15-a.** — W. A. Mozart, de D-ro Hanauer. — La malfeliĉa hundo, verko de S-o A. Lichtenberger, lerte esperantigita de S-o L. Rigoir. — « Konsideroj pri la monda sistemo »; Inĝeniero Pourcines liveras kelkajn klarigojn: « Laŭ la artikolo de S-o Finot, oni povus kredi, ke astronomiisto S-ro Abato

Moreux eltrovis Lowthian Green kaj lian sistemon. La vero estas, de Lowthian Green estas tre konata inter la geologiistoj, ĉefe pro lia verko *Vestiges of the molten globe* (London, 1875)... Diru, la formo de la tero estas kvarflanko piramida, estas tro-grandigo, nur utila por la komprenebleco de la rezonado. » — Pri la sama temo S-o Ol. Wood raportas la opinion de S-o Ch. Lallemand, en la 1903-a kongreso de la « Association Française pour l'avancement des sciences » (Angers). Konfirmas la hipotezon de Low. Green kaj Moreux,

En sama n-o : « Avinoj », de François Coppée, poezio elegante tradukita de D-ro Philippet. Raporto de D-ro J. Hanauer pri la « XIV-a internacia Pacifista kongreso en Lucerno. » Terkultura kalendaro » de P. Champion. — Okaze de kritiketo pri la « Proverboj en Esperanto », S-o G. Grosset tre saĝe diras : « Mi ne bone komprenas kial, iom post iom, oni tiel multe diskutadas pri « gramatiko », anstataŭ lernigi al kelkaj novaj adoptoj la dek ses mirindajn regulojn genie elpensitajn de nia kara majstro ». — Movado Esperantista. — Gazetaro Esp... — Aldono Literatura : « Mallumaĵoj », de Lengyel Pal.

**Internacia Scienca Revuo.** — (feb.). — Pri centra Afriko *La Zande'aj landoj* (de D-re A. Cureau).

En la Zande'a lando estas, laŭ la ĝusta sencoj, nenia vilaĝo. La sociala kaj politika ero estas la *seriba*, t. e. palisarejo difinita por unu estro, kaj analoga, se oni konsentas, kun l'antikva *Frank'a bu go* ». Tiu estro estas nomata « *mbafuka* » ; la reĝo, aŭ arabe. *sultan*, sola rajtas la nomon « *gbja* »..... La sociala stato de la njamnjam'a virino estas, entute, kompatinda ŝia vivo estas, submetiĝo ĉiama kaj plena. Ŝi eliras el la *seriba* nur por iri ĉerpi akvon el fonto kaj kolekti lignaĵojn el arbaro. Kiam ŝin vi renkontas sur vojo, ŝi turnas sin malantaŭen. Ŝia ĉefa okupado, krom la infanedukado, estas la kuirado de la manĝaĵo por sia edza mastro, kaj ĝin ŝi ne rajtas eltuŝi. Al ŝia edza mastro, ŝi parolas nur mallaŭte, genuigite kaj timante lin ekrigardi. Ŝi posedas nenion por si mem, nek vestan tukon, nek ian ajn ornamaĵon : ŝia nura vestaĵo konsistas el du bukedoj da folioj eĉ el ia speciala kreskaĵo, kiujn ŝi pretigas kaj aranĝas laŭmode. — La infanoj vivadas ankaŭ en la *seriba*. De ĝi la virknaboj



sin disigas je l'aĝo, ne tre malfrua, kiam ili siavice povos fondi familion kaj konstrui sian apartan Zeriba'on. — Fine, la *zeriba* enhavas iom multajn geslavojn, altruditajn por lacigaj kaj maldelikataj laboroj.

La ekzistado de tiuj terlaboristoj estas treege riska. Rabaditaj de la trapasanta milisto, altruditaj al l'imposto el bieno kaj el sango, ili posedas nenion, eĉ sian propran vivon. Kia malsameco inter la sklaveco senkompata ĉe la popolaroj, kiuj ricevis la islaman ektuŝon kaj tiu tute familiema ĉe la fetiĉanoj! En la islamanaj aŭ islam-ŝajnigaj landoj, la Mohamed'a influo emas farigi la nekredantan kaptitulon kiel subulo impostebla kaj servutebla ĝis sato. » — La tuta verko estas leginda.

Pri la Sunaj makuloj en 1905 (de Pastro E. de France, esperantigita de P. Corret); raportas pri la tre kleraj kaj sciencaj observadoj de Pastro Moreux. — La Fenomenoj de lumiĝeco kaj iliaj kaŭzoj ĉu ne *ĝiaj* kaŭzoj?), de J. Guinchamp, esper. D-ro Vallienne. — La vivado ĉe la marfundo (D-ro Servin). — La Tero kaj geologia historio de Maroko (laŭ *Revue Scientifique*), de S. Meunier. — Analizoj; Notoj; Informoj.

**Tra la Mondo** (feb.). — Oktobraj detruoj en Rusujo (de D-ro Morgan, Ruso): « Bruligo de centoj da homoj en Tomsk (Siberio), kruela elbato de « zemtsvanoj » en Tver (centra Ruslando): multenombraj okazoj de elbato kaj mortigo de studentoj en Moskvo kaj en aliaj urboj. Ĉio tio ĉi estas nur apartaj epizodoj de detruadoj, kiuj havis lokon en multenombraj punktoj, » — Esperantista movado en Svedujo kaj Rusujo (de Steleto). — Esperanto, Religioj, Filozofio; jen la fama paĝo pri kiu ni parolis en nia lasta numero. Tri artikoletoj de Kolonelo Pollen, Pastro Schneeberger, kaj Abato Peltier, kun tri portretoj de l'aŭtoroj. *Tra la mondo* enpresis jenan noteton. sur paĝo 114-a: « Ofte kontraŭ propagandistoj stariĝas mallarĝaj spiritoj dirantaj: « Esperanto utilas por tiu aŭ alia religio aŭ filozofio — kompreneble ne tiu de l'kontraŭdiranto — kaj mi ne volas ĝin helpi helpante Esperanton ». La Kurioza paĝo 116<sup>a</sup> liveros bonegan armilon kontraŭ tiajn personojn. Ĝi enhavas efektive opinion favoran por Esperanto de tri homoj egale honorindaj, kaj aten-

tindaj same religie aŭ filozofie kie Esperante. Plezure « Tra la Mondo » liveras ilian ŝatindan opinion al siaj legantoj. »

Malbona Volo, rakonteto simbola de Leo Belmont (Polujo). — Monologo por Knabinoj, de F-ino Odilo Prudent (Francujo). — La Vivado de Teoplantisto en Hindujo, verkita de li mem (Alfred T. Simper). — La puntfarado en Anglujo, de S-ino Carlile. — La Generado Spontanea, de Marcel Finot (Francujo): « La eksperimentoj de Pasteur, dum lia fama disputado kun Ponchet, neniel elmontris, ke la spontanea generado estas neebla. Ili pruvis nur ke la eksperimentoj de Ponchet ne estis precizaj kaj ke tie ne estis generado spontanea: — Raportas pri la eksperimentoj de « juna scienculo angla, John Butler-Burke, de la Kambriĝa Laborejo, kaj de S-o Leduc profesoro en la medicina Lernejo de Nantes ». — Gutoj de likvaĵo sur gelateno estus produktintaj « *perfektajn ĉelojn*, je ĉirkaŭoj multangulaj, interne de kiuj oni trovas protoplasmon kaj kernon »: — Ni estu singardemaj! Jam tiel ofte oni eltrovis la « spontanegan generadon! »

**L'Espérantiste** (feb.), -- « La S. F. P. E., ĝiaj grupoj, L'Espérantiste ». de L. de Beaufront. Klarigas la organizacion de la Societo:

« Fakte nunla Societo federas du specojn da membroj — (ordigitaj kiel ni tuj vidis laŭ tri kategorioj) — membrojn izolitajn, membrojn grupitajn. De la izolitaj ĝi postulas nur ke ili aprobu, lernu aŭ vastigu la lingvon. Al la grupitaj ĝi altrudas du pliajn devojn, aŭ pli ĝustadire ĝi postulas de la kuniĝanta grupo du aferojn esencajn por ke la Societo ĝin aprobu: neniam sin okupi en la kunvenoj pri politiko aŭ religio, ne partopreni *korporacie* en manifestacio politika aŭ kulta. Alivorte ĝi postulas, ke ĝia, grupoj bone pruvu per sia konduto la neŭtralecon de l'Esperantismo en ĉio, kio ne koncernas Esperanton kaj ĝian disvastiĝonj

Ni intence forlasas la aliajn detalojn de l'aprobo de la grupoj ĉar ni projektas ilin ekzameni poste kaj ni tuj metas la demandon: *Ĉu la S. f. p. E. estis kaj ankoraŭ estas utila?*

Ni ĝin senpasie ekzamenos en nia venota numero ».

Kroniko franca (raportas pri la artikolo de nia Direktoro en *La Revue Mame* (28 jan.), kaj pri la paĝo de *Tra la mondo* kun la tri portretoj), — Kroniko eksterfranca (Sam. Meyer). —

**Bibliografio.** -- Cirkulero de l'*Centra Oficejo*, : « kiu klarigas, la veron rolon de tiu-ci oficejo « La C. O. estas nur EJO kun OFICISTO, fondita kun la celo « efektivigi unuecon kaj ordon en la laboroj kaj agoj de ambaŭ komitatoj sub la konstanta direktado, kontrolado kaj inspirado de D-ro Zamenhof ». ; ĝi volas, ne direkti kaj regi, sed nur INFORMI KAJ SERVI. Ĝi tute ne pensas fondi ligan aŭ centran organizadon ĝi nur volas esti LIGILO inter la Societoj kaj inter la izolilaj esperantistoj, nur RILATO, nur PERILO, nur INFORMEJO. » Jen bonegaj klarigoj kiuj respondas la demandojn de S-o Seynaeve, en la *Belga Sonorilo januara*. — Kronikoj de Flandro ; *La unutaga Princo* (D-ro P. Rodet). — La Revo, dialago-komedio, de Michel Provins, — Rakontoj Lorenaj (J. Parisot). — Amuzaĵoj.

**La Belga Sonorilo** (feb.). — La dua kongreso de Esperanto : alvoko al la komercistoj. — Civilizaj homoj kaj bestoj (R. V. M.) : « Vi opinias kredeble ke mi intencas paroli pri ia stranga klopodo de malproksime loĝantaj sovaĝuloj. Vi eraras iomete. Ni klarigu unue la signon de sovaĝeco.

Sovaĝuloj — tio estas niaj fratoj, kiuj ne havas pri civilizacio la saman opinion kiel ni — sin ornamas per brilaj plumoj, per multkoloraj perloj, per dentoj aŭ feloj de mortigitaj bestoj ; ili trapikas al si la nazon aŭ la lipon ; tranĉaĵoj sur la haŭto estas ĉe ili signoj de nobeleco ; pentraĵo ekzemple tridenta forko, sur la frunto pruvas submetiĝon al diaĵo, k. t. p. Ĉe malpli sovaĝaj popoloj, Malproksim-Orientanoj, la rajto posedi kaj alfiksi sur ŝia ĉapelo vitran aŭ oranglobeton estas kvazaŭ la celo de la vivo. Kun plej sincera konvinko ni certigas ke ĉio tio estas signoj de sovaĝeco, ne diskutebla malsaĝeco ! Ĉu germana studento ne estas fiero pri malbelegaj tranĉaĵoj tra liaj vangoj ? Ĉu virinoj iafoje ne pentras al si la brovojn aŭ la vangojn, ĉu iafoje ili ne flavigas sian hararon — tiel same kiel niaj sovaĝaj praavoj ? Ĉu ili ne trapikas al si la orelojn por enmeti ringojn aŭ perlojn ! kaj ĉu ni ne admiras dum ni nepre ne miras ? Ĉu la viroj ne klopodas, genufleksas eĉ rampas antaŭ la plej malarta komizo de la Estraro, por akiri kruceton aŭ rubandeton ? Pri tiuj kiuj rajtiĝas porti rubandeton mi ne kuraĝas paroli publike, ĉar mi timas ke iliaj sovaĝulaj emoj vekigu »...

Diversaĵoj : deveno de urbo Antverpeno ; Valonaj Svedoj. — Nia Revueto Respondo de S-o Carlo Bourlet al D-ro Seynaeve : « Vi konkludas el mia artikolo, ke la rolo de la Centra oficejo estas *fakte* tio, kion mi persone deziras ke ĝi fariĝos. Tio estas grava eraro, kaj mi esperas, ke ĝi estas nevola. — Mi tamen devas deklaracii : 1<sup>e</sup> « ke la nuna rolo de l'Centra Oficejo, tiel kiel ĝi estas definita en ĝiaj diversaj cirkuleroj (ĉar mi, kiel ĉiuj esperantistoj, nenion pli scias pri tio) tute ne estas tio, kion mi proponas, ke ĝi estu ; 2<sup>e</sup> ke mi persone neniel partoprenis la organizadon de tiu oficejo, kaj eĉ, ĉar mi ĝis nun ne havis sufiĉan tempon por viziti ĝian loĝejon, mi tute ne konas ĝian internacian organizacion ». Postvenas la « Cirkulero de l'Centra oficejo » pri kiu ni jam raportis. — « Ni organizu la venkon », de J. Coox. — Franca-Flandra Fako. — Belga kroniko. — Komunikaĵoj.

**Germana Esperantisto** (feb. ). — Leopold Einstein ( de D-ro Zamenhof ). Historio de l'unua apostolo de Esperanto en Germanujo. — Kroniko Esperanta (germane). — El germanlingvaj landoj (Esperante). Detala raporto pri la movado Esperantista.

« La profunda silento, kiu longe regis ĉe la gazetistoj rilate nian bonan aferon ŝajnas nun esti rompita. Ĉio devas cedi antaŭ nia potenca Esperanto. La antaŭjuĝoj komencas malaperi, la malfavoraj artikoloj maloftiĝas, la intereso por Esperanto kreskadas kaj ni povas ĝoje diri : La unua batalado estas venke finita.

La « Esperantista grupo Brunsviga » invitas ĉiujn germanlingvajn esperantistojn al ĝenerala kunveno, por fondi « germanan Societon Esperantistan ».

**Ruslanda Esperantisto** ( feb ). — Pri organizacio. Celas la organizadon de Rusa Societo Esperantista. — Aldono al la « Dogmoj de Hilelismo » ( kies nomo estos ŝanĝata kaj fariĝos « Homaranismo » ) ; « Ni atentigas ke la publikigitaj « dogmoj » havas signifon nur principan, kaj ilia definitiva redakcio estos fiksita en la unua kongreso de la hilelistoj. Ĉiun, kiu en principo aprobas la ideon de la hilelismo, sed ne konsentas kun tiu aŭ alia dogmo, ni petas montri al ni, kiajn ŝanĝojn laŭ lia opinio estus utile fari en la diritaj dogmoj ».

Historio de unu nedankema popolo; fabelo por grandaj infanoj (de T. Ŝĉ-ij), — Kio estas la Socialaj Sciencaj (de Prof. N. T. Karejev). Artikolo leginda. — En « Letero malfermita » P-o Dombrovski, nia eminenta kunlaboranto, sciigas, ke li ĉesis esti Prezidanto de *Societo Espero* kaj « ĉesas ankaŭ preni la respondecon pri la enhavo kaj la direkto de *Ruslanda Esperantisto*. — Ruĝa Rido (de Leonid Andrejev). — Esperantista movado. — Federacio de la Oficistoj de Francujo. — Alvoko (de V. Devjatnin): L'aŭtaro pensas, ke ne ekzistas sufiĉe da gazetoj Esperantitaj, kaj li proponas ke oni « fondu internacian societon por eldonado de granda « ĵurnalo internacia » (monata aŭ semajna) kun plej diversaj fakoj ». — Kredeble S-o Devjatnin, unu el la plej bonaj poetoj Esperantistaj, *tute forgesis* la ekziston de *Lingvo Internacia* kaj de *Tra la mondo*, eĉ de *Espero Katolika*, en kiuj troviĝas sufiĉe da bona literaturo kaj da *diversaj fakoj*. — Fortikigu ni la jam ekzistantajn gazetojn antaŭ ol fondi novajn!...

**La Suno Hispana** (feb.). — Pri la protokolo de l'Unua kongreso kaj organizo de l'Dua Kongreso. — Sciigoj: Hispanujo: « Pastro skolapia Bruno Rodriguez ĵus publikigas en la ĉiusemajna gazeto de Tarrasa, « Egara », interesajn artikolojn sub la titolo « Un curso de Esperanto », laŭdante nian karan lingvon por belegaj frazoj. Tiu ĉi S-ro varma Esperantisto, faras tie gravegan propagandon per paroladoj en « Junularo Katolika », senĉesajn verkojn nen la tieaj gazetoj kaj esperantajn kursojn.....

« La Verdad » (el Murcia), sub la titolo « Notas Esperantistas » enhavas bonan verkon ankaŭ de S-ro Codorniu.

— La tri amikoj (el france Tradukis Francisko Domingo).

— Anekdoto (Esperantigis R. Ayza). — Spritaĵo- Problemoj.

— La Espero, de Châteaubriand (traduk. K. Ayza). *Espero Katolika* publikigis tradukon de sama teksto en ĝia 11-a numero (p. 7.) Oni utile komparos la du tradukojn. — Aldono; Kuracisto per batoj.

**Antaŭen Esperantistoj** (Jan.). — Cirkuleroj de la Centra oficejo. — Bolivia Esperantista Societo estas fondita. Sekretario S-o Daniel Canedo, Las Paz, Bolivilando. — Bibliografio. — Presaro. — Kroniko.



**Esperantisten** (Febr.). — Letero de D-re Zamenhof, al la Direktoro. — « Saluto », poezio de Clarence Bicknell. Esperanto ĉe la Blinduloj (de H. Thilander)

« La penso pri Esperanto servante al la blinduloj eknaskiĝis en Stokholmo, kaj dank'al la *De blindas Veckablad* ĝi rapide divaŝtigis al ĉiuj partoj de la regno. Samtempe la suprenomita artikolo de nia amiko, sinjoro Ahlberg, altiris al nia peno la atenton de la vidantaj samideanoj..... Ĝus nin preparante por tiu batalo, alkuris al nia flanko nia heroo kaj fortegulo, tiel amata, la viro vivanta nur por aliaj, *la homo kun la fera volo kaj la oro karo*, « *la patra patrono de la blindaj esperantistoj* », profesoro Theofile Cart. Li mem kaj lia laboro homama estas tro konataj por ke mi bezonu uzi multajn vortojn pri li; mi tial nur rakontos maldetale kion li faris por la blinduloj, kaj tiom pli ĉar tio estas la plej esenca parto de mia rakonto ».

— Esperanto en Nordo (P. Ahlberg). — Rigardo sur la Esperanta gazetaro. (Nenio troviĝas pri *Espero Katolika*, ĉu la Redaktoro ne ricevis interŝanĝe nian revuon?). — La Esperantismo (teksto de la *Deklaracio* de D-ro Zamenhof).

**Alĝeria Stelo** (feb.-5-a). — Ĉe Alĝesiras. — Invitas ĉiujn Esperantistajn Eŭropajn grupojn sendi senprokraste al ilia nacia riprezentano ĉe Alĝesiras notojn atentigantajn al Esperanto » Bonega ideo. — Alĝera Esperantista laboristaro (Verda Stelo), — La kredo de la puloj (D-ro L. B.). — Kiel oni devas starigi la litojn (El Londona gazeto: *The Grand*: tradukis F-no E. J. C.). — La Morto de Martino la Paŝtisto (Esperantigis grafo A. Gallois). — Dekkvinaŭgusta ordenito (de A. Daudet, esperantigis A. Baissac. — (feb 25-a.) Daurigo de samaj rakontoj — Plie : anoncas konkurson pri Esperanto en « *Les Annales Africaines*, » — Niaj unuaj paŝoj (La Redakcio).

**Esperanto** (de Budapest) Feb. — Vivo ĉe la Tibisko. (El l. hungara de *Maŭro Jokai* tradukis *Ad. Altemburger*). — La sunforto (daŭrigo) de Boriso Kotzin, — El feliĉa Vojoĝo, verkis N. P. Evstiffeief (daŭrigo). Epizodo impresiga de la lastaj okazintaĵoj en Moskvo, — Okaze de la kongreso en Genevo (Th. Rousseau).

**Revuo de l'Esperanto.** (Marto). — La teatro kaj Esperanto (A. M.) Proponas, ke oni uzu teatron kiel propagandilo de Esperanto. — Hamleto (laŭ Victor Hugo, esperantigis Grafo), — Bona propono : « Ĉu ligo de ĉiuj Esperantistaj havenurbanoj ne estus necesa ; ĉu gi ne havus hodiaŭ sian pravecon por helpi la alilandulojn marveturistajn ? Per la lingvo Esperanto, ni devus kune fari ĝin kiel estas hodiaŭ ĉe la maristoj, la marsignala leĝaro,

Francoj kaj Anglanoj de longa tempo tre bone kompreniĝis por alprenigi la marsignalan leĝaron, kies uzado hodiaŭ altrudiĝis preskau ĉie. Krom la utileco de tiu marsignalaro, la lingvo esperanta estus ankaŭ necesa por helpi ĉiujn alilandulajn marveturistojn ! Kial iaj signaloj estus necesaj se poste oni ne povas tre bone kompreniĝi parole ? tial la lingvo esperanta estus certe la perfekta plenigo de la marsignala leĝaro ! Estas tre kompreneble ke ĉiuj maristoj bezonas kompreniĝi ĉiam kaj ĉie, tial ni proponas fondi ligan esperantistan por helpi ĉie la maristojn, kiam ili ne povos kompreniĝi ĉe alilanduloj ; ĉar ne nur ni faros tiel al marveturistoj la plej grandajn servojn, sed ankaŭ nia daŭrigos ĉiam kaj ĉie nian propagandan celon por Esperanto per tiuj kiuj vojaĝas en la tutmondo.

Ni estas tute certaj ke tiu ideo interesos vin kaj eble estas ekceptota de ĉiuj havenanoj Esperantistaj. Pri tio, ni atendas per niaj journaloj viajn avizojn aŭ observadojn por reparoli kaj ĝin daŭrigi. (IU ŜIPEKSPLUATISTO).

**Esperanto Ĵurnalo** (feb. 11-a). Pri Esperantismo en anglujo K. L.). En kunveno de la *Londona Esperanto Kluba*, « D-ro J. C. O'Connor, vic-prezidanto, kiu enkondukis esperanton en Londono, mirigis la ĉeestantojn anoncante ke estas *sep membroj de la nuna angla regnestro, enhavante la ĉefojn de l'fako edukada, kiuj favoras esperanton*, kaj Sir Edwin Cornwall, prezidanto de L. E. C., estas preta por stari advokato pri esperanto, aŭ pri simila internacia lingvo en sia projekto por kongreso de ĉefurboj » — Esperanto kiel pedagogia rimedo (S-o Muffang) — Alvoko por la rajtoj de la nacioj : « Vastega Unuiĝo jus fondiĝis, kiu celas unuigi anojn de ĉiuj la subpremataj nacioj : Poloj, Irlandanoj, Alsaco-Lorenanoj, Katalanoj, Armenia-

noj, Litvanoj, Finlandanoj, Bohemoj, k. t. p., kaj ankaŭ ĉiuj ajn personoj, kiuj deziras kunbatali por la sama ideo.

« Tiu Unuiĝo nomiĝas : « Unuiĝo por la rajtoj de la nacioj ». Alvoko, france redaktata, estas jam presita. Ĝi estos sendata al ĉiu persono, kiu ĝin petos de la « Secrétariat de l'Alliance pour les droits des nations ; 13, Bld. des Philosophes, Genève (Suisse) ».

« La lingvo Esperanto ludos tre gravan rolon por la ŝtatoj de la malgrandaj nacioj, kies lingvoj estas malmulte disvastigataj ; oni ŝajnas povas esperi, ke Esperanto tre bone taŭgos kiel internacia komprenilo por tiu nova kaj gravega « Unuiĝo ».

(**Feb. 25-a**) — Internacia Mutualismo (P. Berthelot). Leĝinda. Montras la neeblecon de « mutualismo ŝtata », per kiu Ŝtato promesus mem pagi la rentojn. La libera mutualismo (k. ekz. *Les Prévoyants de l'Avenir*) donas mirindajn rezultojn, sed tamen ne estas sendanĝera. La rimedo eviti tiujn danĝerojn estas, laŭ S-o Berthelot, « internacia mutualismo. »

« La savo de la mutualismo, la certigo de ĝia estonta progresado estas sekve en ĝia internaciigo. Antaŭ longe, tio estus estinta tre granda malfacilaĵo. Nun, kun helpo de Esperanto, la afero estas glata. Kelkaj mutualistoj sin kunigis en komitato, kiu ellaboris projekton de *Internacia Mutualista Societo*. La afero estas preta, kaj proponota en kunveno kiu okazos en Genevo, je l'okazo de la II<sup>a</sup> Esperantista kongreso, kvankam tute ekster, tiu kongreso. Tamen, restas kelkaj malfaciloj solvotaj, precipe pri la leĝoj al tiu temo rilataj, tre diversaj en la diversaj landoj. En celo faciligi la disputadon de la definitiva regularo, ni tre petas diverslandajn mutualistojn kaj juristojn, kunigi sin al ni por helpi nin per siaj konsiloj kaj lumoj.

« Tiel estos eble ke, de la septembra kunveno eliros nova mutualaĵo kiu per pacaj kaj bonfarantaj procedoj, kondukos en la homaro iom pli da bonstato, dolĉigos la interklasajn rilatojn, kaj helpos al la ĉesigo de la sociaj maljustoj. »

**Esperanto (Bulgara :** (Feb.). — Dialogo (H. Boucon). — Propagando en la Komercistaro. — Esperanta mielkuko (M. G.). — Esperanta Ekspozicio en Amiens.

**Lorena Esperantista Journalo** (marto). — El la grupo de Nancy; « Pli ol iam, ni atentigas pri utileco de niaj vesperaj

babiladoj, kiel rimedo por perfektigi. Ni aŭdis, ke kelkaj aĵoj ne kuraĝas alveni, tial ke ili ne estas sufiĉe lernintaj kaj spertaj. Ni petegas, ili nenion timu. Eĉ komencantoj povas esti certaj, ke baldaŭ ili facile komprenos, kaj tute ne rikoltos mokojn aŭ ridojn, sed kontraŭe, ricevos plej afablan akcepton. Ili do venu kiel eble plej akurate; ili estos la bonvenintaj.

## LINGVAJ DEMANDAJ

### en la Revuoj Esperantistaj

**Pri la vortfarado** «... Mi rimarkis, ke la pli novaj aŭtoroj esperantaj penadas je malfacilega vortfarado kaj turnofrazoj. Tre ofte mi devas interrompi la fadenon de mia legado Esperanta antaŭ vortoj, kiuj — sendube tre genie kunmetataj — prezentas al la tradukado multajn embarasojn, kaj mi diras kaposkuante: Jen estas la laŭdata facileco de Esperanto! — Poste l'aŭtoro kritikis la esprimojn « *Mi nomas vin bona* » kaj « *estas danĝere rajdi sur leono* » (Arno Erust, el Brazillando; *Lingvo Intern.* feb. 15-a).

S-o Samuel Meyer, la klera kronikisto de *L'Espérantiste*, donas klarigojn pri la samaj dirmanieroj, citaĵo de D-ro Zamenhof mem.

Ĉu la Esperantistoj ne komprenos, fine, ke tiaj diskutadoj pri malgravaj lingvaĵoj estas granda perdo da tempo? cetere, tiuj kritikitaj esprimoj troviĝas en la netuŝebla « **Fundamento de Esperanto** ». Kial diskutadi pri ili?

**Pri la du novaj « prepozicioj »**. — Letero de S-o Gaston Moch al la *Lingva komitato*. Proponas *a* aŭ *ab* por esprimi « ablativon » latinan « *amata a ĉiuj* », anstataŭ « *amata de ĉiuj* ». Proponas *from* aŭ *fro* por esprimi la foriron de loko: « *foriro de Napoleono from la Insulo Elbo* »; — *depost* por esprimi la *tempon* de ekmovo « *mi estas en Parizo depost hieraŭ* ». Tiu esprimo estas tuj uzebla, tial ke ĝi ne estas *novaĵo*, sed nur kunmetita vorto ne uzita ĝis nun. KANADANO kontraŭe parolas pri *malbezono de du novaj prepozicioj*. (El *Internacia Scienca Revuo*, feb.).

**Pri la proponita vorto « plura »** S-o A. Kofman esti-

mas, kontraŭ S-o Samideano, ke tiu vorto ne estas necesa por diri « *plusieurs* » (*Inter. Scienca Revuo, feb.*).

Pri la sufikso « *izi* ». Daŭrigo de diskutado pri la neceso aŭ sen neceso de tiu nova sufikso, SAMIDEANO opinias, ke ĝi estas necesa, — kaj kun li konsentas Karlo Verks — por iaj « teknikaj esprimoj ». — La Redakcio de I. S. R. rimarkigas ke tiu diskutado sufiĉe daŭris, kaj ke « ĝi ĉesos empresi ion pluan pri nomita temo ». — Tre saĝa !

**Vortfarado** « La vorto « *bezonesti* » estas kunmetita tute regule, kaj vi povas ĝin uzadi. Sed entŭte ni konsilas pli uzadi ĉiam formojn simplajn aŭstataŭ kunmetitaj. Kunmetado de vortoj estas karaktera eco de la lingvo germana, kaj al tiu ĉi efektive donas grandan riĉecon de formoj ; sed en nia lingvo la vortoj pleje estas pli naturaj kaj pli bonsonaj se ili estas ne kunigataj, sed uzataj aparte. » — De D-o Zamenhof. (*Esperantisto, marto 1891*). — Represita en *Esperanto Ĵurnalo* (11-an de feb.)

---

## NOTETOJ

**Grupo Esperantista de Tours.** — La grupanoj kuniĝas la 1-an kaj 3-an dimanĉon de ĉiu monato Bulvardo Béren-ger, 6, kaj estas tre feliĉaj akcepti ĉiujn Esperantistojn, kiuj trapasas la urbon. Ekster tiuj Tagkunvenoj, la fremdaj Esperantistoj povas sin turni al la kasiso de l'Grupo, S-o Maurice Patin, 5, strato Michelet (Miŝle) Tours.

**Esperanta Radikaro.** — Krom la eratumoj montritaj sur aparta folieto, troviĝas ankoraŭ jenaj ;

Legu : alĥemi, baldaken, bateri, 37, Car, Di, diinasti, divizi, flesksi, galant, galanteri, garnizon. industri, inicitiv, kontakt (N<sup>o</sup> 160), konvuls, konvolv, latun (aust. latuk), mirh (anst. mirk), 211, pat, ovaci, oval, prozodi prudent, sakr.

Forprenu la infinitivani aparten, direkt, dub, eksped, ekspluat, kapitulac, et obe.

## BIBLIOGRAFIO

**Poŝlibro internacia por aferistoj, turistoj k. c** (de Georges Norman). Parizo, Hachette, 2 fr.

Tre praktika libro da 24 paĝoj. I-a parto: Gregoria kaj Julia, rapidega ĉiama kalendaro, (kun ĉefaj moveblaj festoj, ĉefaj fiksj aŭ nemoveblaj festoj; kun progresaj diferencoj inter la Nova stilo kaj la Malnova). — 2-a parto Internaciaj egaleco-tabeloj pri moneroj, pezaj, mezuroj kaj kutimaj komercaj prezoj. Fine: utilaj termometraj komparadoj. — Tiu libro tre utilas al ĉiuj esperantistoj, kiuj pli-malpli bezonas kompari diversnaciajn monerojn, mezurojn, k, p. t.

**La Interrompita kanto** (de Eliza Oresko) tradukis el Pola lingo *kabe*, Parizo, Hachette. — (80 p., 75 centimojn). Libro kiu plaĉas al virinoj (kaj ankaŭ al viroj!...)

En ĝi ni retrovas la belan, klaran, harmonian stilon e l' trze lerta aŭtoro de « *La fundo de la misero* ». Jen vera stilo Esperanta, kiu ne montras ian nacismon.

**Pola Antologio**, elektis kaj tradukis *Kabe*. Kun antaŭparolo de P-ro Th. Cart. — Parizo, Hachette (150 p., 2 fr.).

Jen kelkaj linioj el la « *antaŭparolo* » de S-o T. Cart: « Mirinde, la aŭtoro konservis por niensia esperantigado tiun strangan ĉarmon de l' slava literaturo...; tion mi laŭdos ĉe *Kabe*, ke li elektis prezipe aŭtorojn polajn ne tre konatajn ekster Polujo, skribintajn pri plej diversaj temoj sopiro al la patrujo (Lanternisto, Srul et Lubartov), amo al la homaro (Legendo, sur la ferdeko), humorajo (Cu ŝi amas) k. t. p.

**Verkaro**, de V. N. Devjatnin. Libro unua. — Parizo, Hachette (136 p., 2 fr.).

S-o Devjatnin unu el la bonegaj poezoj esperantaj, sub la titolo « *Verkaro* » kolektis siajn poesiojn. — La dua libro baldaŭ aperos. En *Antaŭparolo* l'aŭtoro rakontas kiel li fariĝis esperantisto kaj post kelke da tempo li kvazaŭ dormadis, preskaŭ tute forgesis la lingvon (same okazis kun alia poeto, S-o Grabovskij).

Devjatin estis vekita de sia amiko D-ro Naŭman kaj nun li kuraĝe bataladas por Esperanto. (Bedaŭrinde troviĝas en la libro sufiĉe multaj preseraroj, kiuj espereble malaperos en dua eldono).

**Homaranismo** (Hilelismo) St-Peterburgo, presejo de Necobrut.

Tiu 16-paĝa broŝureto sen nomo de aŭtoro eĉ estas sendita al ni el Varsovio. Ĝi estas aparta eldono de l'artikolo; *Hilelismo*, aperinta en *Ruslanda Esperantisto*. -- La enhavo de tiu-ĉi broŝuro estas sufiĉe grava por ke ni dediĉu specialan artikolon pri ĝi, en venonta numero de E. K. Sufiĉega materialo malhelpis ĝin eldoni en tiu-ĉi numero.

**Esperanto utan Larare**, de P. Ahlberg, lernolibro 24 paĝa por la progresado de nia afero en Svedujo,

### ALIAJ LIBROJ RICEVITAJ :

Analizotaj en venonta numero :

Les mots esperantos groupés d'après le sens, de M. Bodin.

Mallumaĵoj de Ab. Arpad.

Elementa fotografa optiko, de Karlo-Verks.

Clef du Radikaro.

Tiuj libroj estas ĉiuj eldonitaj de la Presa Esperantista Societo, 33, R. Lacepède, Parizo (Francujo).

## MONOFEROJ POR ESPERO KATOLIKA

KVINA NOMARO : S-o Bréon (Vincennes) 1 fr. — J. Cyroj (Beaune) 2 fr. — Farette (Nantes), 2 fr. — Anonimo, 10 fr. — E. V. Honincks (Laplante) 4 fr.

Antaŭaj donacoj 430 fr. + 19 fr. = 449 fr.

Restanta ŝuldo 700 fr. — 449 fr. = 251 fr.

Al ĉiuj donacintoj plej sinceran dankon.

Em. PELTIER.

## ABONMONOJ RICEVITAJ

### PLENAN ABOMONON NI RECEVIS

*En Franclando* (4 fr.) de : Bréon, Vincennes ; Farette, Nantes ; — Esperantista Grupo, Bourges ; — Gaudard, Besançon. — Caminade, Rivesaltes.



*Ekster Francj.* (5 fr.) de Servais, Namur; — Jos. Vogel, Paderborn; — P. D. Hugon, Londres — Betegh, Imre, Csisco-Kerestur; ankoraŭ ŝuldata: 2 fr. 50. — G. Christoffel, Brŭnsvick; ankoraŭ ŝuldata; 2 fr. 50; Ferrand, Namur; ankoraŭ ŝuldata: 2 fr. 50; — 2 fr. 50; Bianchini, S. Vito al Tagliamento: 10 fr. por du abonoj; — Brossard, Laprairie; — Societo Espero, Ĥabarovsk-s-Amur; Ŝtirlin, Ĥabarovsk-s-amur: ankoraŭ ŝuldata: 3 fr.; — E. Cuvelier, Anvers; — Don José Gonzalez, Valence; — Jeronimo Cordoba, Sevilla.

### PLENIGITAJ ABONOJ DE

L. Pourcines, Nancy. — S.-ino Tobie, Croix. — F-ino Blaise, Gévingey. — Seignemorte, Flamerans. — F-to Bernard-Louis, Besançon. — Offret, Lyon. — Honincks, Laplante-Namur.

**ERATUMO:** En la n-o 26-a de E. K. la lastan frazon sur paĝo 8-a, pro bedaŭrindaj preseraroj faringintan nekomprenbla oni devas legi jene;

« Tial, se la hostio konsistas el  $m$  atomoj, la tuta do Krista Korpo el  $m+n$  atomoj, post konsekrecio en la hostio konsekraĉita  $m$  atomoj de Krista Korpo ostos *ex vi sacramenti*, la restantaj do  $n$ , *ex reali concomitantia*. » — Simile en la apuda rimarko anstataŭ: « — en + en aŭ kontraŭe », oni legu « — en + aŭ kontraŭe ».

**EN VENONTAJ N-OJ DE E. K.** — estos legeblaj artikoloj pri: Hilelismo aŭ Homaranismo; — Fundamento de la morala unueco de l'homaro; — Io pri la homa saĝmallarĝeco (A. Dombrowski); — Unuiĝo de Kristanaro (novaj aliĝoj); — Paĝo de la presinda Preĝaro, ktp., ktp.

## ŜAKOJ

Sub la Redakcio de So. J. Ellis el Keighley (Anglujo)

LECIONO III. — Ŝak' kaj ŝakmortigo.

ŜAK (radiko devenita de la persa *ŝah* = reĝo) estas la vorto kiun ludanto, kiu rekte atakas la kontraŭan Ron elparolas tuj

kiam li faras la atakon. Ne pli ol du pecoj povas ŝaki per la sama iro. Se alia peco, krom R, estas atakata kaj neniel evitas la atakon, ĝi povas esti kaptata je la proksima iro, sed R devas nepre elŝakiĝi. Vi povas elŝakiĝi trivoje: (1e) kapti la atakantan pecon; (2e) irigi vian R-on al neatakata kv. neregata de kontraŭa peco; (3e) intermeti unu el viaj pecoj inter la ŝakita R kaj la atakanta peco tiel, kiel vi ŝirmas la R-on, permesante ke la intermetata peco suferas la atakon anstataŭ la R. Vi vidas, do, ke se Ĉ aŭ S ŝakas, la lasta rimedo ne estas efektivi- vigebla. Se ŝakata R ne povas elŝakiĝi la ludo finiĝas, kaj ĝia ludanto estas perdinta (malgajninta) la ludo. Li estas ŝakmorti- gata m. aŭ ŝm.)


Memoru ĉiam: vi ne povas iam tiamaniere irigi pecon, ke via R estas ŝake. Per tio mi intencas diri, ke via R neniam povas irigi ŝakŝirmantan pecon, tiamaniere ke ĝi ĉesas ŝirmi la R-on. Legu tiun regulon en ĉiu frazo, kiun mi jam skribis. Sekvas, ke du R-oj ne povas stari sur du plejapudaj kv-oj, ĉar ili sin reciproke ŝakus.

De la komenco ĝis la fino, ĉiu ludanto celas Ŝakmortigi la alian. La vojoj estas ekster kalkulebleco, sed la celo ĉiam res- tas la sama.

Ĉe la proksima leciono, ni traludos ludon kun la intenco montri kiel oni povas disvolvi la pecaron, kaj elmontri eblajn luderaĵojn.

PROBLEMO 6-a (E. E. Westbury)

NIGRO 7 PECOJ.



BLANKO: 5 PECOJ

B. Komencas kaj mortigas per la 2-a iro.

SOLVO DE PROBLEMO 4-a (de Steleto)

1-a iro de B estas: D. 3Ĉ.

Se N	1 Ĉ×K	2 D. 3KD mortigas
Se	1 Ĉ.5KD	2 Ĉ. 3Ĉ m
Se	1 K.5KD	2 <u>S. 6K ŝak</u> (malsirm.) 3D.3Cm.
		Ĉ×K
Se	1 T×S	<u>2 T. 4T ŝak.</u> 3Ĉ. 3Ĉ m.
		Ĉ (aŭK) 5KD
Sc	1 S.6R	<u>2 T. 4T ŝak.</u> 3D×S m.
		K. 5KD
		aŭ N 2Ĉ. 5KD 3D. 4KR m.

ERATUMO en la Ludo de N-o marta Anstataŭ 11 K. 3D, legu: 11 R. 3D.

ANNALES DE PHILOSOPHIE CHRÉTIENNE (*Analoj de Filozofio Kristana*) — Direktoro Pastro Laberthonnières Administracio Librejo Bloud, 4, rue Madame, Paris; abono jara : 20 fr. — 100 paĝoj monate. — La plej internacia, plej serioza, plej progresema revuo filozofia!

REVUE DU CLERGÉ FRANÇAIS (*Revuo de Franca Pastraro*). — Redaktoro Pastro J. Bricout, 17, rue Fénelon. Administracio: Librejo Letouzey et Ané, 76 bis, rue des Saints-Pères, Paris. Jarabono 23 fr. (En Franc. 20 fr.) 110 paĝoj monate. Revuo tre progresema pri studoj pastraj. En ĝi kunlaboras la plej kleraj pastroj francaj.

L'INSTITUTEUR BELGE, semajna ĵurnalo, organo de la Federo nacia de l'komunumaj liberaj Instruistoj. Jarabono: 3 fr. 50 en Belgujo, 78, r. de l'Amitié. LA LOUVIÈRE. — Kurso pri Esperanto, de I. Savres.

ESPERANTA LIGILO, monata revuo en reliefpunktoj por Blinduloj. Jare 3 fr. por ĉiu lando. Direktoro: Prof. Th. Cart. 12, rue Soufflot, Paris. — Januaro 1906. Enhavo Kroniko (Th. C.) — Problemo. — Poezio Birdetoj (Fr. Coppée). — Humoraĵo: Pruvo, Decido. — Miksaĵo: proverboj (F. Zamenhof) — Felietono: Parolado de D<sup>ro</sup> Zamenhof en Boulogne-sur-Mer.

ESPERANTAJ ŜLOSILOJ, de ĈEFEC, 45, Christchurch Road, Streatham Hill, London, S. W. — Estas nun aĉeteblaj: la angla, germana, franca, itala, hispana, rusa, kaj sveda eldono, kaj riceveblaj po 3 fr. 50 la centon (100). Ĉiulandaj poŝtsignoj estas laŭ efektiva valoro akceptataj. — Je la sama adreso POŝTKARTOJ kun teksto kaj adreso de diversaj naciaj societoj esper. — Po 1 fr. 35 la centon (100).

LE COLLECTIONNEUR UNIVERSEL, Karto-Filatelistá

kaj literatura revuo. — Konkursoj kun premioj, anoncoj senpagaj por l'abonantoj. — 10.000 legantoj. Jarabono 2 fr. (en Franc. 1 f. 50). Specimen. 15 centim. Direktoro Cl. Guinot, 38, r. de Chalon, Le Creuzot.



**CINDRULINO, KUN SES ILUSTRAĴOJ**  
 N-<sup>o</sup> DUA DE LA ILUSTRITA ESPERANTA BIBLIOTEKO  
 por infanoj.

ĴUS APERIS : 0 fr. 50 afrankite.

KATO KUN BOTOJ kaj CINDRULINO kune mendataj kostos nur  
 0,75, afrankite.

« TRA LA MONDO » (*Tutmonda multilustrata revuo  
 esperanta*). — Nuntempaĵoj; arto, literaturo, sciencoj; komerco,  
 industrio; militistaro, maristaro; teatro; sportoj; virina kaj  
 gejunula paĝo; felietono; ludoj, konkursoj kun valoraj monaj  
 premioj. — Jare 8 fr. kvaronjare : 2 fr. 25. — Turnu vin 15,  
 boulevard des Deux-Gares, Meudon (S.-et-M.), France, aŭ al la  
 Direktoro de E. K.

Abono sen pluaj elspezoj en francaj poŝtoŝtupoj.

**LINGVO INTERNACIA ESTAS NUN DUONMONATA.**  
 — Envasas 32 paĝojn. Sen literatura aldono : 5 fr. — kun lite-  
 ratura aldono 7 fr. 50. Adreso nova : Presejo Esperantista, 33,  
 rue Lacépède, Paris, 5<sup>e</sup>.

**ESPERO PACIFISTA, MONATA ORGANO DE LA  
 SOCIETO POR LA PACO,** abono 5 fr. kun aliĝo al la  
 Societo kaj ricevo de la aldonoj.

S-ro Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine  
 (Francujo).

**RONDIRANTA MANUSKRIPTO,** ĉiumonata, nur inter-  
 pastroj katolikaj el ĉiuj landoj Eŭropaj. Partopreno senpaga.  
 Oni povas skribi pri ĉiaj aferoj, precipe religiaj, kaj korektas  
 reciproke la tekstojn. Tio tre utilas por plibonigi stilon esp.,  
 ellabori terminaron teologian, kc.; estas tre agrabla. Sin turni  
 al SERVAIS P-ro Kat., ĉe Basilides, pl. Leopold, 7, NAMUR,  
 Belgujo.

• ➤ **LE SOUVENIR,** Monato Ĵurnalo literatura. — BELGUJO :  
 1 frank. — Unuiĝo poŝta 1 fr. 50 — Direktoro-Fondatoro :  
 XAVIER CASIER, Premiita de Akademio Reĝo de Bel-Artoj,  
 membro de komitato de Unuiĝo de perioda Gazetistaro ».

**KOLEKTISTOJ** S-o, VARJU Endre, Budapest, IV, Kygio  
 U-E 62, em, 14, kolektas k. intersang. uzitajn poŝtm.

**LONDONO;** PENSIO por gesinjoroj, Moderaj prezoj. Oni  
 parolas k. korespondas Esperante, Angle kaj France. — S-ino  
 O'Connor, Esperanto House; 17, St-Stephen's Square; London-  
 Bayswater.